




## El la enhavo:

La asocia konferenco  
Parolado de la prezidantino  
Aperis Ŝvejk en Esperanto  
Vondroušek - Scheiber  
KAEST 2004  
Mladá Boleslav + Mnichovo Hradiště  
Josef Hradil 80  
Libera Universitato Kelemantia



## ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**Junaj esperantistoj ĉe la konferenco en Olomouc  
prezentas sian artan programon**

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 10 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte), **rete Starto:**

malovec.starto@clavis.cz,

www.clavis.cz/starto, **rete ĈEA:**

cea.polnicky@quick.cz (sekretario)

podhradska@volny.cz (prezidanto)

www.kuk.cz/cea/

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokategorioj:** A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, D 500 Kč, Z 1000 Kč, Starto-abono 200 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova@quick.cz

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 15200 Praha, tel. 251 817 732, m.pluharova@worldonline.cz

**Sekcioj de ĈEA:** junulara, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia, gazetara-informa

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady

**Asocia koresponda adreso:** c/o Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

**IĈO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:**

3330 021/0100,

Komerční banka Poděbrady

**ISSN 1212-009X**

## Komitato de ĈEA:

**Prezidanto:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradska@volny.cz (vnější a vnitřní vztahy, čestní členové)

**Vicprezidanto:** Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova@quick.cz (zápisy, koncepce, metodika)

**Vicprezidanto (komitatano A de UEA):** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinárodní vztahy, UEA, vydavatelská činnost)

**Sekretario:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz (sekretariát, členská základna, účetnictví)

**Kasisto:** Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha, tel. 220 879 386 (konference, sjezd)

**Komitatano:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, 461 532 257, dvorakovalibuse@quick.cz, dvorakova.libuse@khspe.cz (kluby)

**Komitatano:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (sekce, komise)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Prezidanto: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef.hron@vakpce.cz, tel. 466 401 942; Věra Štěpánová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., slaharova.v@kr-ustecky.cz; Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek.pcp@lf3.cuni.cz

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, malovec@volny.cz, malovec.starto@clavis.cz

**Kontrollegis:** L. Dvořáková, P. Polnický, V. Kočvara, M. Pastrňák

**Gazetara-informa komisiono:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek

**Redakto-fermoj:** 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

## La asocia konferenco

En la tagoj 19.-21.11.2004 kunvenis en Olomouc 112 esperantistoj el la tuta respubliko por trakti pri la asocia agado dum la pasinta kaj venonta jaroj. Bedaŭrinde ĝustatempe aliĝis nur naŭdek personoj, aliaj venis lastatempe, tial en la mendita restoracio Fontana estis ĉiuj kunpremitaj kiel sardinoj.



**Programo.** Tamen la programo estis sufiĉe riĉa. Vendrede vespere P. Chrdle rakontis (kun lumbildoj) pri UK en Pekino, pri ILEI-konferenco kaj SAT-kongreso en Bratislava kaj pri KAEST en Dobřichovice. La sabata antaŭtagmezo estis dediĉita al la konferenca traktado kaj finita per prelego pri la lingva situacio en Eŭropa Unio (Petr Chrdle kaj liaj lumbildoj). Loka vira koruso kaj kelkaj infanoj prezentis siajn koncertaĵojn kiel kulturen kompletigon de la konferenco. Posttagmeze lokaj klubanoj montris dum promeno vidindaĵojn de sia urbo. La promeno finiĝis en la preĝejo de Sankta Maŭricio, kie organisto post interesa prelego pri sia muzikilo prezentis kelkajn komponaĵojn. Vespere sekvis amuza programo kun muziko, danco kaj tombolo. La dimanĉa antaŭtagmezo estis destinita por demandoj al la komitatanoj, sed la diskutantoj pli parolis pri agado de siaj kluboj kaj rondetoj.

**Konferenca traktado.** La sabatan traktadon inaŭguris P. Chrdle per gratuloj al

novembraj vivjubileuloj, D-ro Josef Hradil kaj Linhart Rýznar, Honoraj Membroj de ĈEA, kaj al Jiří Vychodil pro Honora Membreco de UEA atribuita en Pekino. Poste sekvis minuto da silento rememore al la forpasintoj de la lasta konferenco, inter ili du Honoraj Membroj de ĈEA, Drahomír Kočvara kaj Adolf Staňura.

La asocia prezidantino Věra Podhradská prezentis sian paroladon, kiun vi trovos tuj post tiu ĉi artikolo.

La sekretario Pavel Polnický informis pri la stato de membrobazo ĝis la 10-a de novembro 2004: 827 membroj + 1 kolektiva (AEH). Laŭ kategorioj: A 102, B 244, C 96, D 3, Z 2, FA-FZ 19, F 361. Do preskaŭ duono estas la ne plu pagantaj dumvivaj membroj (F), kio unuflanke stabiligas la membrobazon, aliflanke kaŭzas financajn problemojn, ĉar krom la kotizoj kaj libervolaj donacoj la asocio ne havas aliajn enspezojn.

### Dimanĉa diskutado.

Josef Hron informis pri la **busa ekskurso** de AEH al la 90-a UK en **Vilno** (22.-31.7.2005), pri la eblo pagi rabatitan kongresan kotizon ĝis la fino de 2004 pere de KAVA-PECH. Petro Chrdle la informojn kompletigis.

Jiří Vencl invitis al la tradicia **Silvestra tago** en Česká Třebová la 29-an de decembro 2004.

Václav Kaprál raportis pri planataj aranĝoj: **ekspozicio pri aplikado de Esperanto** en Pilsena biblioteko (20.5.-30.6. 2005), pri **100 jaroj de EK Plzeň** (27.-29.5.2005), pri junia renkontiĝo en Plasy kaj aŭgusta en Nekvasovy.



Viktor Dvořák vigligis la diskutadon per demando, ĉu ne estus pli taŭge diskuti jam sabate posttagmeze post la ĉefa programo, kiam ĉio estas ankoraŭ viva en la memoro kaj promenon lasi al dimanĉo.

Jindřiška Drahotová laŭdis kurson *Flugiloj de malfacila vento* dum ILEI-konferenco en Bratislava kaj invitis en aprilo al Skokovy.

Miroslav Smyčka informis pri sia translokiĝo al České Budějovice, instigis porti insignon, por ke la publiko mem demandu pri Esperanto kaj invitis al IFK, Ĉeĥa-Saksa tago kaj januare al prelego de J. Navrátil en la urba biblioteko, ĉiuj ankoraŭ en Ústí.

Vlastimil Kočvara sciigis pri sia laboro en Esperanto-muzeo en Česká Třebová, kien li daŭre veturas labori ordigi la kontribuojn de kluboj, kaj Libuše Dvořáková priskribis sian traktadon kun la nova direktorino - regas ankoraŭ modera optimismo.

Jiří Vychodil dankis pro sia honorigo, kiun li komprenas kiel honorigon de la blindula sekcio, kiu baldaŭ festos sian 30-jariĝon.

Miroslav Malovec invitis al omaĝo de J. Vondroušek kaj V. Scheiber, Jan Řepa same substrekis neceson partopreni tendaron en Lančov kaj Josef Vojáček priskribis la klopodojn de esperantistoj ĉe EU.

Pluraj diskutantoj dankis al klubanoj de EK Olomouc jak al Libuše Dvořáková pro oferema preparo de la konferenco.

## Parolado de la prezidantino

Estimataj kaj karaj gesamideanoj,

mi kore bonvenigas vin okaze de 10-a konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Mi estas feliĉa, ke vi denove alvenis en tia nombro en tiun ĉi belegan historian urbon Olomouc.

Do denove rapide forpasis la jaro kaj ni renkontiĝas en jubilea 10-a konferenco de ĈEA. Se mi menciis la jubilean konferencon, mi volas ankaŭ rememorigi, ke en marto, nome la 29-an kaj 30-an 1969 estis refondita Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Certe vi multaj scias, ke en la kvindekaj jaroj nia asocio estis nuligita, sed tamen niaj kluboj kaj Esperanto-rondetoj aktivis ĉe diversaj kulturaj domoj aŭ ĉe sindikatoj aŭ ĉe tiel nomata Osvětová beseda. Kaj finfine en la jaro 1969 ni povis denove eklabori en propra organiz-aĵo.

La fondkongreso okazis en Brno kaj ĉe estis preskaŭ 400 personoj. Estis elektitaj gvidorganoj kaj mi supozas, ke estas necese memorigi tiujn, kiuj elstaris kaj komencis novan etapon de Esperanto-movado en nia respubliko. Multaj el ili estas ĝis nun aktivaj, multaj bedaŭrinde jam estas en la Esperanta ĉielo.

Nu, jen ili estas:

La unua *prezidanto* estis fame konata Josef Vítek, Mělník

*Vicprezidantoj* – Ing. František Sviták, Praha – Drahomír Kočvara, Ostrava

*Sekretario* – Pavel Polnický, Poděbrady

*Estraranoj* – Jaroslav Mařík, Praha – Zdeněk Hršel, Brno – Jiří Pondělíček, Praha



*Komitataĵoj* – Oskar Hrubý, Ĉ. Budějovice – Ing. Ladislav Krajíc, Tábor – Vladimír Bořánek, Plzeň – RNDr. Vlastimil Novobilský, Ústí n/L – Miloš Hruška, Jablonec – Linhart Rýznar, Svitavy – Naděžda Zedníčková, Lanškroun – Pavel Sittauer, Třebíč – Ing. Vlastimil Kočvara, Opava – Drahomíra Zdvihalová, Praha.

*Vickomitataĵoj* – Josef Vondroušek, Brno – Tomáš Balda, Řevnice – PhDr. Jaromír Jermář, Praha – František Wohlmuth, Domažlice – Oldřich Kníchal, Praha – Ing. Zdeněk Polák, Litoměřice – Jarmila Rybáčková, Pardubice – Josef V. Otta, Šumperk.

*Revizia komisiono* – Ak. arch. Josef Drlík, Praha – Milada Josková, Praha – JUDr. Vladimír Mohapl, Olomouc – Ing. Aleš Bednařík, Brno – Gustav Kremláček, Žďár n/Sáz.

Kaj ankoraŭ, kie ni kongresis:

1. Brno - marto 1969 – 400 ĉeestantoj
2. Praha – februaro 1976 – 200 ĉeest.
3. Praha – februaro 1979 – 300
4. Pardubice – marto 1982 – 400
5. Olomouc – septembro 1987 – 200
6. Třebíč – novembro 1990 – 300
7. Karlovy Vary – majo 1993 komuna kongreso kun GEA – 300
8. Havířov – novembro 1996 – 130
9. Tábor – oktobro 1999 – 115
10. Praha – novembro 2002 – 100

Tiu ĉi parto apartenis al rememoroj, nun mi revenos al nia reala vivo. Do al ĉio, kio okazis de post la lasta konferenco en Litomyšl.

Starto n-ro 4/03 enhavis sufiĉe detalan informon pri la konferenco. Interalie ankaŭ viajn rimarkojn, atentigojn kaj proponojn, kiuj estis de la komitato konsideritaj.

Laŭ la programo de la ĉi-jara konferenco, ni revenos al tiuj aferoj dimanĉe, kiam nia traktado estos dediĉata al diskutado kun la tuta komitato, kiam unuopaj estraranoj respondos viajn demandojn, aŭskultos viajn atentigojn, proponojn ktp. Dum tiu tempo vi povas ankaŭ nin ĉiujn informi pri via agado, pri viaj aranĝoj, pri viaj spertoj ktp.

Kaj kio estas nova en interna vivo de nia asocio? Mi denove, kiel kutime komencos ĉe komitato. Dum la pasinta tempo la komitato kunvenis 5 foje. La kunvenojn pro ŝparo de mono ni minimumigis, se estas necese ni komunikas per interreto.

**Nova asocia vicprezidantino.** Nia vicprezidantino Lucie Karešová naskis bebon kaj pro tio ŝi nun rezignis je funkcio en la komitato. Laŭ Statuto de ĈEA de hodiaŭ estis kooptita la longjara komitata kunlaborantino **Jana Melichárková**, interalie prezidantino de pedagogia komisiono kaj prezidantino de landa ILEI-organizo, aŭtorino de lernolibro por infanoj.

Kiel ĉefdelegito de UEA Lucie Karešová laboros plue, kaj mi kredas, ke kiam ŝia infano pli kreskos, ŝi certe rekandidatiĝos al la komitato de ĈEA. Permesu al mi, ke mi danku al ŝi pro ŝia ĝisnuna laboro en la komitato, mi deziras al ŝi, ankaŭ en via nomo, ke ŝi fartu bone, ke ŝia fileto bone kresku.

La komitato decidis komenci publikigi en WWW-paĝoj eltiraĵojn el komitata traktado. Detalojn pri asocia WWW paĝoj vi aŭdos dimanĉe dum labora traktado.

Kiel ĉiujare, ankaŭ dum la pasinta jaro okazis multaj Esperanto-aranĝoj, kelkaj jam tradiciaj, kelkaj novaj. Preskaŭ pri ĉiuj vi estas informitaj en STARTO, pri tradiciaj vi jam multfoje aŭdis.

Ekzemple Adonido Ratíškovice, seminarioj de AEH Skokovy, renkontiĝo en Plasy, SET jam 52-a, katolika tendaro en Sebranice, refreŝiga tendaro en Nekvasovy, kultura festivalo en Ústí. Ankaŭ variaj renkontiĝoj en diversaj urboj, tradicia Šumperk, Polička, Svitavy kaj kio estas tre bona, infanaj renkontiĝoj – Svitavy - Česká Třebová – Ratíškovice.

Sukcesa estis Esperanto-ekspozicio en Valtice, kiun organizis direktoro de Nacia Agrokultura Muzeo – Ing. Jaroslav Pokorný. Oficialan, solenan inaŭguron partoprenis pli ol 40 gastoj el Valtice kaj ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ el Opava, Obořiště, Brno, Znojmo, Třebíč, Mor. Budějovice. La feston partoprenis ankaŭ vicurbestrino de Valtice. La ekspozicio daŭris unu monaton kaj vizitis ĝin ĉirkaŭ 350 personoj kaj laŭ notoj en muzea libro oni vidas, ke inter ili estis ankaŭ eksterlandanoj, eĉ el Aŭstralio, kaj ke ekspozicio estis sukcesa.

Agentejo KAVA-PECH, - t.e. nia vicprezidanto Petr Chrdle - organizis flugkaravanon al UK Pekino. Plue SAT-kongreson kaj ILEI-konferencon en Bratislava, postkongreson en Bohemia Karsto. Se mi menciis UK-on, mi devas aldoni, ke dum la kongreso nia blindula

aktivulo Jiří Vychodil iĝis Honora Membro de UEA.

Sekretario Pavel Polnický, kiu samtempe estas funkciulo de KELI, organizis sukcesan KELI-kongreson en Bystřice p/Host.

Prezidanto de IKUE s-ano Šváček organizis karavanon al IKUE-kongreso en Litovio.

Jarmila Rýznarová, prezidantino de AEH-IKEH, organizis konferencon en Pardubice, samtempe kun fama Esperanto-tago.

Pasintan semajnon okazis en Dobřichovice faka aranĝo - KAEST.

La 4-an kaj 5-an de decembro okazos en Brno festo *Ora duopo* omaĝe al 100-jariĝo de famaj esperantistoj el Brno, honoraj membroj de ĈEA, Josef Vondroušek (HM UEA) kaj Vilibald Scheiber. Invitilojn vi trovis en la lasta numero de Starto.

En Dobřichovice realiĝos tutsemajna Paroliga kurso, plejparte por eskterlandanoj – ĉe-metode. Kurson gvidos Stano Marček.

La 10-an–12-an de decembro okazos en Ústí n/L komune Kultura Festivalo kaj Ĉeĥa-Saksa Tago.

Kaj certe kiel kutime la jaron 2004 adiaŭos esperantistoj jam tradicie en Česká Třebová.

Kion diri pri sekcioj kaj komisionoj. Regule laboras sekcioj katolika (IKUE), fervojista, KELI, por nevidantoj, informadika.

Pri aliaj ni scias preskaŭ nenion.

Pedagogia komisiono – skribaj kursoj funkcias, sed intereso estas preskaŭ nenia. Kiel aspektas intereso pri interretaj Esperanto-kursoj ni bedaŭrinde ne scias. En Prago sub gvido de Tomáš Břicháček ekzistas kurso por junuloj, pri ili vi povis legi en Starto. Paroligaj kursoj (PK): nunjare ni provis novan formon – nome, organizi paroligan kurson ĉe loka Esperanto-klubo. PK-on, kiun organizis EK Ostrava Vítkovice, partoprenis plejparte lokaj anoj kaj el proksimaj urboj, sed ankaŭ alveturis fidelaj partoprenantoj malproksimaj. PK estis vere sukcesa. Do, se estas inter vi ankaŭ interesatoj kun kondiĉoj por organizi PK ĉe vi hejme, la lektoroj volonte alveturos al vi. Pri tiu temo ni povas babili ankaŭ morgaŭ, ni atendas viajn proponojn.

Katolika sekcio estas la unusola sekcio, kiu regule nin informas pri sia laboro per propra organo Dio Benu.

KTI – longjara gvidanto kaj unu sola membro Drahomír Kočvara bedaŭrinde forpasis (precize antaŭ unu jaro 20. 11.). Pro lia malsano dum la pasinta konferenco transprenis lian laboron – kolektadon de eltranĉaĵoj el diversaj gazetoj – Jarmila Čejková, kiu alportis ĉi tien tiujn plej interesajn, kiujn vi povas dum nia traktado trarigardi.

Ankoraŭ estas necese menciigi pri Esperanto-muzeo en Česká Třebová. Bedaŭrinde fariĝis neatendita situacio, kiam en Urban Muzeon venis nova juna direktorino, kiu faris grandajn ŝanĝojn, kiuj por Esperanto ne estas bonaj.

Ĉar la venontan jaron okazos la 11-a kongreso de ĈEA, laŭ nia Statuto la komitato nomumis du komisionojn:

**komisiono elekta:** prezidanto: Kvido Janík, membroj: Jana Křížková, Jiří Pištora,

**komisiono por modifi Statuton de ĈEA:** Pavel Polnický, Josef Hron, Jiří Tomeček, dr. Zdeněk Rusín.

Ambaŭ komisionoj jam komencis labori, kaj vi havas eblon sendi al la komisionoj viajn proponojn, atentigojn ktp.

Kaj nun mi estas ĉe grava afero por venonta jaro. La komitato jam komencis prepari la kongreson, per traktado en Vyškov.

Vi ankaŭ scias, ke kongreso atribuas Honoran Membrecon por eksterordinaraj meritoj en disvolvigo de Esperanta movado aŭ interlingvistiko. Se vi hazarde scias pri iu meritulo, sendu proponon al la komitato, pere de mi, ne pli malfrue ol ĝis 31. 3. 2005.

Antaŭ ol mi transdonos vorton al Pavel Polnický, kiu informos vin interalie pri nia ne tre bona ekonomia stato, permesu al mi, ke mi danku al ĉiuj, kiuj helpas al nia asocio, sed ankaŭ al E-movado pere de sia laboro, ekonomia helpo, subtenoj ktp.

Mi dankas por via atentemo kaj deziras al vi belajn travivaĵojn en Olomouc, deziras al vi multajn sukcesojn, firman sanon kaj ĝojas ĝis revido.

*Věra Podhradská*



## Pri la agado de la klubo Mladá Boleslav–Mnichovo Hradiště en la jaro 2004

En la gimnazio de doktoro Pekař en Mladá Boleslav J. Drahotová instruis Esperanton ĝis fino de la lernejjaro. Partoprenis 6 gelernantoj po unu horo semajne, la kurson daŭrigas 5 progresantoj. Novajn lernantojn ni ne sukcesis trovi malgraŭ propagando de *Dŭm dětŭ a mládeže* kaj *OAZA dětŭ*.

Miroslav Vaněk en la retejo ĉe la adreso [www.mlboleslav.cz/esperanto](http://www.mlboleslav.cz/esperanto) plu aperigas dulingve informojn kaj artikolojn. Por la agentejo *Praga magica* ni preparis iliajn www-paĝojn en Esperanto. Informaj paĝoj de la magistrato en Mladá Boleslav, kiujn ni printempe transdonis al la magistrato en Esperanto, ankoraŭ ne estas legeblaj en la retejo, ĉar la anglaj kaj la germanaj paĝoj ne estas pretaj.

Medicinan terminologion kaj historion de pacifismo en Ĉeĥio plu prilaboras MUDr. J. Hradil. Per tradukoj de faka medicina literaturo ĉeĥa, angla, slovaka kaj germana li kontribuas por la gazeto „Medicina Internacia Revuo“.

Semajnaj lingvaj seminarioj en Skokovy okazis en aprilo kaj novembro kun kvardek kvin kaj tridek tri partoprenantoj. Partoprenis amikoj el Pollando. Pri la seminario aperis plurfoje artikoloj en lokaj gazetoj.

La gazetaro skribis ankaŭ pri „bapto“ de libroj *Osm let na cestách po naší planetě* kaj *Legolibreto*, kiu okazis en la urba biblioteko.

La klubo traktis pri eldono de tradukoj el Esperanto al la ĉeĥa. *Maskarado ĉirkaŭ la morto* jam tri jarojn kuŝas en la eldonejo Primus, kiu faris ja korektadon, sed tamen bedaŭras, ke pro manko de la mono ĝi ne presos la libron, kaj proponas serĉi alian eldonejon. *Troje zápisky* ne ricevis subtenon, kiun petis por ĝi la eldonejo Volvox Globator. *Paĉjo, kio estas rasismo* fine post tri jaroj aperis en la ĉeĥa lingvo, tradukita el la franca originalo. Tial nia traduko pere de Esperanto estas ne plu aktuala. *Danĝera lingvo* de Ulrich Lins jam estas tradukita al la ĉeĥa kaj korektata... Kiu helpos, ke ĝi povu aperi???

Legolibreto II estas korektita kaj preta por preso. Eble ĝi aperos jam januare.

En aŭgusto ni gastigis francan familion kaj en septembro alian francan, Bruno Henri. Li venis en gimnazion kaj dum leciono de la franca lingvo propagandis Esperanton. En oktobro nia klubo helpis gastigi brazilanon Clovis Portes, kiu interesiĝis pri persono de Jan Hus.

J. Drahotová partoprenis la konferencon de ILEI kaj SAT-kongreson en Bratislava, kie ŝi transdonis al s-ro McGill (por trastudi) lernilon, kiun ŝi verkis dum kvar jaroj kun gimnazianoj Brom kaj Hrdlička. Kvarfoje ŝi prelegis pri lingvaj problemoj (dum majo kaj decembro) ĉe „Universitato de tria aĝo“ en Mladá Boleslav.

*Jindřiška Drahotová*





## Haltis la malkresko de la membronombro de UEA

La konstanta falo en la membronombro, kiun UEA spertas de multaj jaroj, ŝajne haltis. Tamen la kvanto de individuaj membroj ankaŭ en ĉi tiu jaro ne atingos la simbolan nombron 6.000, kiun la asocio ĉiam superis post la jaro 1953 kaj ĝis 2002. En la sukcesa jaro 1991 la kvanto de individuaj membroj eĉ superis 8.000. La 12-an de novembro 2004 UEA havis nur 5.697 individuajn membrojn, sed en gazetara komuniko la asocio raportas pri "forta kresko". "La membraro de UEA forte kreskas" estis la titolo de gazetara komuniko, dissendita en la fino de aŭgusto. Tiam UEA havis 5.615 individuajn membrojn, kaj dum la sekvaj monatoj aldoniĝis ankoraŭ kelkdek. Meze de novembro 2004 UEA havis proksimume 130 individuajn membrojn pli ol meze de novembro 2003. Kresko, jes, je proksimume 2,3 procentoj.

Tamen la "forta kresko" supozeble aludis al la kvanto de aligitaj membroj, kiuj ĉi-jare estos klare pli multaj ol en 2003. En 2003 estis 11.264 tiaj membroj, kaj ĉi-jare ĝis nun estas jam pli ol 12.000 aligitaj membroj, kvankam ne ĉiuj asocioj ankoraŭ pagis siajn kotizojn.

Por la financoj de UEA la aligitaj membroj tamen havas malmultan signifon, ĉar aligita membro pagas nur du procentojn de la kotizo de individua membro. Tiel 12.000 aligitaj membroj finance egalas al 240 individuaj membroj - tamen kun la diferenco, ke al

la aligitaj membroj ne necesas sendi la revuon nek la Jarlibron.

La ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller, supozas, ke ĝis la fino de la jaro la nombro de individuaj membroj estos proksimume 5.800.

- Komence de novembro la CO dissendis leteron al la pasintjaraj membroj, kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizon por tiu ĉi jaro. Ĝi estis sendita ankaŭ al la Membroj-Abonantoj el 2002, kiuj ne remembriĝis poste. Entute temis pri 850. Parto el ili certe ankoraŭ kotizos por 2004, kvankam unuavice oni celis revarbi ilin por 2005.

La simbolan limon de 6.000 individuaj membroj Osmo Buller esperas denove superi en la venonta jaro.

- Se oni pensas ekzemple nur pri tiuj, kiuj ankoraŭ en 2003 membris en UEA, la potencialo por atingi tiun celon ja estas abunda, komentas Osmo Buller.

Unuafoje post 1997 denove plimultiĝas la junaj individuaj membroj de UEA, alivorte TEJO-anoj. Dum ses jaroj TEJO ŝrumpadis, kaj en 2003 la junulara sekcio de UEA havis nur 399 individuajn membrojn. Ĉi-jare TEJO pasis la limon de 400 individuaj membroj jam somere. Fine de aŭgusto TEJO havis 419 individuajn membrojn.

En sia gazetara komuniko UEA konstatas, ke temas "ne pri hazarda fenomeno, sed pri komenco de nova solida kresko de la Asocio".

Ankaŭ respondante al la demandoj de Libera Folio, Osmo Buller sonas optimisma.

- Estas eble, ke la totala membronombro de UEA ĉi-jare kreskos per tuta milo, li konstatas.

Tamen, kompare kun ciferoj de antaŭ kelkaj jaroj, la kvanto de individuaj membroj restas tre malalta. En la jubilea jaro 1987 la nombro de individuaj membroj estis 7.291, kaj la suma kvanto de membroj en la sama jaro estis 43.642. Poste, en la jaro 1991, la nombro de individuaj membroj atingis 8.071, kvankam samtempe la kvanto de aligitaj membroj malaltiĝis. En januaro 1992 la revuo de UEA eĉ aperis kun la kovrila frapfrazo: „Super la oka milo - kie la tegmento?“

La malkresko en la kvanto de aligitaj membroj dum la lasta jardeko kaj duono estas frapa, de pli ol 36.000 en 1987 al 12.000 en 2004. Tamen, tiu malkresko grandparte ŝuldiĝas al la sociaj ŝanĝoj en orienta Eŭropo, kaj estas kredeble, ke parto el tiuj aligitaj membroj neniam estis esperantistoj.

Tute sendepende de tio, ĉu UEA dum la venonta jaro kreskos je du aŭ ducent procentoj, ĝi tamen restos mikroskope malgranda kompare kun multaj aliaj internaciaj civitanaj organizaĵoj. Ekzemple Amnestio Internacia havas 1,8 milionojn da membroj en la mondo, kaj preskaŭ 60.000 nur en Svedio.

Aliflanke, inter la internaciaj esperantistaj organizaĵoj UEA estas la senkompare plej granda. La plej proksima konkuranto, SAT, havas malpli ol 900 membrojn, kaj el tiuj preskaŭ triono estas francoj. Inter la internaciaj Esperanto-organizaĵoj UEA estas escepta ankaŭ ĉar ĝi malferme publikigas sian membrostatistikon.

## **Ekfunkciis novaspekta retpaĝaro de REU!**

La adreso estas malnova - <http://reu.ru/>, tamen 1) nun la paĝaro jure apartenas al REU (Rusio), kaj 2) la aspekto dank' al laboro de Igorj Safonov kaj Aleksandr Osokin estas tute nova - laŭ opinio de certaj kompetentuloj pri desegnado de TTT-ejoj, moderna kaj laŭmoda. Ekde nun novaĵoj pri E-movado en Rusio aperados sur la paĝoj tiom regule, kiom aperados.

Ene de la paĝaro estas kreitaj kelkaj forumoj, kie eblos libere pridiskuti movadajn kaj lingvajn problemojn, kaj, i.a., senrezerve kritiki la estraron kaj aliajn gvidorganojn de REU. Fakte, laŭ la ideo de la kreintoj, la forumoj povos grandparte anstataŭi la diskutadon en la dissendolisto <reu-agado>.

*Nikolao Gudskov*

## **Grafikisto serĉata!**

La eldonejo de Monato serĉas duan grafikiston por parte transpreni la enpaĝigon de la revuo. La enpaĝigisto ricevos de la eldonejo pretajn tekstojn en RTF-formo, same kiel diĝitajn fotojn, kaj devas mem krei el tio plaĉaspektan aranĝon per programo kiel Pagemaker. La kovrilon de Monato la enpaĝigisto mem elpensas surbaze de la artikoloj en la revuo.

Kandidatoj disponu pri bona rapida retkonekto. Ili preskribu sian ĝisnunan grafikan sperton kaj financajn postulojn al la jena adreso:

[monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be)

Flandra Esperanto-Ligo

## La angla *full immersion* en Italujo

La nuntempaj registaraj direktivoj pri lingva kulturigo *full immersion* (= plena enmergiĝo) de la junaj italaj civitanoj kreas fortan ekscitiĝon en lernejoj de multaj italaj urboj, kie multobligas kursoj por instrui kiel instruisian fakon en la angla (ankaŭ ne konante ĝin sufiĉe) kun granda kontento de British Council, USIS kaj simile.

Oni konjektis prave, ke per la malmultaj horoj destinitaj al lingva lernado oni ĝis nun akiris mizeran konon de la angla kaj, do, plej bone la angla enŝoviĝu ankaŭ en la horojn de scienco, geografio, historio, gimnastiko k.c.

Estas tamen permesite dum la paŭzo paroli itale.

Cetere la fama sociologo Alberoni, kiu disdonas konsilojn ĉe la unua paĝo de *Corriere della Sera*, la ĉefa itala tagĵurnalo, kvankam antaŭnetrolonge verkinta artikolon kun titolo “**Popolo, kiu rezignas sian lingvon, perdas ankaŭ sian animon**”, poste, eble pentinta, ke li tro kompromitiĝis en defendo de naciaj kulturaj identecoj, instigis zorgoplene per alia artikolo kun titolo “**Ni urĝe eduku instruistojn de la angla!**” ĉar “La angla estas la universala lingvo”, “La angla estas la lingvo uzata en Eŭropunio” kaj turnis sin al Ministro pri Instruado petante, ke oni eduku novan figuron de lingvo-instruanto, nur kondiĉe, ke li konas la anglan. Tiam Alberoni ne pensis pri tre simpla solvo de la problemo: instrui la anglan al instruistoj pri aliaj lernobjektoj, por ke ili instruu angle – vera kolumba ovo!

## Eksperimentado de E-o en Eŭropa Unio

**1. La celo de eksperimento.** Junaj homoj ricevu instruon kiel transponti lingvajn barojn per a) instruado de planlingvo kaj b) uzo de komunikaj kaj komputilaj rimedoj. Ili pere de rektaj kontaktoj familiariĝu pri la kulturaj diversecoj. Nia eksperimento estas en eŭropa kadro, tial ni ne povas kalkuli pri grandaj diferencoj en kulturaj kondutoj.

**2. Realigado.** Komence la infanoj ricevos relative intensan instruadon de lingvo en 24 horoj, plenumebloj dum du semajnoj. Estus dezirinde, se jam en tiu ĉi parto la lernantoj familiariĝus al la uzo de komunikaj kaj komputilaj rimedoj. La dua parto okazus dum la lerneja duonjaro per komunikado inter diverslandaj lernantoj.

**3. Instruista apogo.** Oni povas atendi, ke ankaŭ instruistoj povas alproprigi Esperanton en la unua fazo tiomgrade, ke ili povu komuniki kun diverslingvaj eksperiment-partoprenantaj instruistokolegoj.

**4. Taksado de rezultoj.** Oni taksas, kiel la lernantoj povas komuniki transnacie. Oni sekvu la evoluon de ĉiu lernanto per persona dosiero, kiu donos realan bildon pri la evoluo de lingva scio de infano.

**5. disponeblaj fortoj.** Dudeko da E-instruistoj estas disponebla internaciskale, unu instruisto povus instrui en pluraj lernejoj, lokoj, landoj. Ekzistas dekduo da instruprogramoj, ekzemple 'lernu.net'.

*Adapto laŭ Bujdosó I., Universitato Budapeŝto*

## Nova Sento en Reto:

### 400-a jubileo!

La reta informilo de Itala Esperanto-Federacio kaj de Itala Esperantista Junularo antingis sian 400-an numeron. La unuan eldonon, en septembro 1997, ricevis 75 pioniroj de elektronika poŝto. La 400-an numeron ricevis pli ol 2000 esperantistoj kaj simpatiantoj, plejparte italaj.

La celo de la reta cirkulero estas duobla:

- a) kunligi italajn esperantistojn per ofta kaj rapida informilo;
- b) disdoni informojn al tiuj, kiuj alproksimiĝas al la movado.

Por ricevi la cirkuleron sufiĉas sendi mesaĝon al [nova-sento@esperanto.it](mailto:nova-sento@esperanto.it) aŭ viziti la retpaĝojn <http://www.esperanto.it/html/nsir.htm> (ital-lingva)

Sincerajn gratulojn al Francesco Amerio ([f.amerio@libero.it](mailto:f.amerio@libero.it)), kiu de la komenco ĝis hodiaŭ nelaciĝante zorgas pri la regula kompilado kaj distribuado de la informoj.

## Terminologia Esperanto-Centro

havas novan diskutejon <http://groups.yahoo.com/group/terminologio> kaj retejon <http://www.terminologio.subito.cc/>. La aŭtoro, brazilano Luko Jasumura, prizorgas ĝin laŭ peto de UEA. En la paĝo oni trovas la terminologian kurson de Jan Werner kaj diversajn artikolojn pri terminologia laboro, ligojn al retaj terminaroj kaj propran vortaron, kiun oni povas riĉigi laŭ instrukcioj. La retejo nur kristaliĝas, ĝi ankoraŭ ne havas definitivan formon, post certa eksperimentado ĝi verŝajne ankoraŭ ŝanĝos sian aspekton.

## Reta Vortaro

<http://www.uni-leipzig.de/esperanto/voko/revo/> prilaboras la E-vortprovizon kun tradukoj al la naciaj lingvoj. Unu el la ĉefaj gvidantoj estas akademiano Marc Bavant, aŭtoro de Matematika vortaro (KAVA-PECH 2003), kiu prelegis ĉe KAEST 2004.

## Astronomia Terminaro

<http://esperanto.org/AEK/AT/> aplikas la saman programon kiel la Reta Vortaro, sed laboras memstare, dediĉas sin vere nur al astronomio, tial la astronomiaj terminoj estas multe pli riĉaj ol en la ĝenerala Reta Vortaro.

## Wikipedio

La reta enciklopedio en Esperanto jam enhavas 18.400 artikolojn pri ĉiuj eblaj temoj. Kontribuas ankaŭ kelkaj ĉeĥoj.

## Esperanto-muzeo en Česká Třebová serĉas novan lokon

Fine de novembro decidis la magistrato de Česká Třebová ne plu financi la Esperanto-kolekton en la Urba Muzeo, ĉar la tutlanda kolekto ne taŭgas por nur urba muzeo, kiu bezonas spacon por siaj propraj kolektoj. Ni rajtas lasi la kolekton unu jaron kaj dume trovi novan lokon, kien ni povu la materialojn transporti. Proponojn sendu al la sekretario Pavel Polnický.



## Vilnius 2005

De la 23a ĝis la 30a de julio 2005 efektiviĝos en Litovia ĉefurbo Vilno (Vilnius) la 90-a Universala Kongreso de Esperanto. Rememorante neforges-eblajn busajn ekskursojn al Montpeliero kaj Zagrebo, Asocio de Esperantistoj Handikapuloj venontjare aranĝos por siaj membroj, membroj de ĈEA kaj de ili rekomenditaj interesatoj pluan ekskurson al relative proksima frateca lando ĉe sukkena bordo de Balta maro, Litovio.

Litova respubliko estas lando kun miljara historio, ŝtato, kiu vikle evoluas en ĉiuj flankoj, de la 1-a de majo 2004 memrolando de la Eŭropa Unio, samkiel la Ĉeĥa respubliko.

Malnova parto de la urbo Vilnius estis en la jaro 1994 enskribita en la mondan kulturan heredaĵon de UNESKO. Ĝi estas unu el la plej grandaj (ĉirkaŭ 360 ha) kaj plej belaj malnovaj urbopartoj en Meza kaj Orienta Eŭropo, iom sugestanta pri antikvaj riĉaj urboj de Italio - Romo kaj Florenco. Kontraŭe, la hodiaŭa Vilnius estas moderna urbo havanta ĉirkaŭ 600 milojn da loĝantoj.

Ni supozas, ke ni veturos per buso, en kiu estos aĉeteblaj trinkaĵoj, el Pardubice trans Olomouc, Český Těšín kaj Varsovio, kaj ke ni loĝos en Vilno en nemultekosta studenta loĝejo. Ni kompreneble ĉeestos la Kongreson kaj en libera tempo ni entreprenos kejlkajn ekskursojn en proksima kaj malproksima ĉirakŭaĵo de la kongresurbo, ekzemple al: Trakai, Kaŭnas, Klaipéda, Palanga, Monteto de Krucoj k.s.

Kostoj por transporto inkluzive de

ekskursoj kaj loĝado ne superos 7000 kronojn.

Interesatoj pri la ekskurso povas anoncisan intereson ĉe AEH, Na Okrouhlíku 953, Pardubice 530 03 kaj ricevos pli detalajn instrukciojn.

Ĝis revido en Vilno!

## Ankoraŭ pri lingvoj en EU

Al mia artikolo pri lingvoj en Eŭropa Unio en la antaŭa Starto kelkaj legantoj atentigis min, ke en la listo de al EU kandidataj lingvoj mankas ankoraŭ la bulgara kaj islanda. Ili pravas kaj mi sincere senkulpigas min. Plie ili atentigis min, ke en listo de ceteraj vivantaj lingvoj en Eŭropo mankas ankaŭ pliaj. Jes, ili ekzistas, sed iliaj parolantoj jam estas nur nemultaj. Bedaŭrinde la forpaso de la lingvoj en Eŭropo ankoraŭ ne finiĝis. Antaŭnelonge mi legis, ke la antikvan kelt-baltan lingvon, la kuronan, mastras nur ununura homo, Richard Pietsch. Tiu vivas en pensiula hejmo kaj simbole gravurigis sur sia estonta tombo komencon de Preĝo de la Sinjoro: „Teve mused, ker tu es danguj...“ Sed kiu komprenos ĝin, post kiam la maljunulo mortos?

Jozefo Hron

## Martiro Josef Toufar

antaŭ 55 jaroj, en decembro 1949, moviĝis kruco sur altaro en Čihošť, pro kio la komunisma polico arestis kaj dum enketado batmortigis la paroĥestron Josef Toufar. Detalan priskribon de la tragedio preparis J. Hamajdová por Dio Benu.



## P.F. 2005

Paní Müllerová, co to provolává  
pan Švejk na tom invalidním vozíku?

Ale volá na Brusel.

Jedeme tam sehnat Opodeldok,  
kterým mu mažu nohy a móc mu to  
pomáhá.

Třeba tam budou mít  
ještě něco lepšího  
a zpátky se do Vás pan Švejk  
jako štramák zavěsí  
a vozík poveze v letadle  
jako vzpomínkové spoluzavazadlo.

A o tom všem bude pak Josef Švejk  
vyprávět štamgastům u Kalicha.

PS: Nakonec rady zlatý klíček -  
nechod'me na led neznámý,  
abychom si nohu nezlomili u vrbiček  
při uklánění před pány.

PSPS: Přišlo i pokárání ať PS vynechám.  
Nechávám každému na vůli,  
zda si je přečte nebo ne.

*Čestmír Vidman*

## P.F. 2005

Sinjorino Müllerová, kion propre  
vokadas

sinjoro Švejk sur tiu invalida veturileto?

Ja li vokas ek al Bruselo.

Ni veturas tien akiri Opodeldok,  
per kiu mi al li ŝmiras la krurojn kaj tio  
al li multege helpas.

Eble oni tie havos  
ankoraŭ ion pli bonan  
kaj returne al Vi sinjoro Švejk  
kiel kavaliro kroĉos  
kaj la veturileton veturigos en la aviadilo  
kvazaŭ rememoran kunpakaĵon.


Kaj pri tio ĉio poste Josef Švejk  
rakontos al la regulaj gastoj ĉe Kalich.

PS: Fine de la konsilo ora ŝlosileto -  
ni ne surpaŝu glacion nekonatan  
por ne rompi al ni kruron ĉe saliketoj  
dum kliniĝado antaŭ moŝtuloj.

PSPS: Venis eĉ admono ke mi PS ellasu.  
Dependas de ĉies volo,  
ĉu li ĝin legos aŭ ne.

*Čestmír Vidman*

## Ŝvejk komplete en Esperanto



Prezo 39 EUR, 980 Kč (ĉlenovĉe ĈES ziskajĉi po *jednom exemplĉari za vĉyrobĉnĉi cenu, jeŝtĉe neurĉena – zhruba polovic*).


Eldonejo de Petro Chrdle KAVA-PECH ĵus eldonis la plej faman reprezentanton de la ĉeĥa literaturo **Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk** de Jaroslav Hašek (1883-1923) en traduko de Vladimír Váňa (1932-2000). La libro aperis en la serio Oriento-Okcidento, volumo 38. Pri envicigo de libroj en la serion decidas UEA kaj kvankam tio signifas la devon donaci al UEA pli da ekzempleroj ol kutimajn du (por esti envicigita al "Laste aperis"), la eldonejo tion tre volonte faras, ĉar temas pri donacoj i.a. al la biblioteko de Unesko kaj por aliaj gravaj propagandaj celoj. Plie tio verŝajne levos atenton de estontaj legantoj.

La unua parto estis destinita jam por la Hašek-jaro 1983, sed ĈEA ne sukcesis eldoni ĝin. La manuskripto kuŝis en Opava ĉe V. Kočvara, ĝis fine de 1996 ĝin enkomputiligis Josef Mendl el Milevsko. La espero aperigi la verkon en interreto aŭ kompaktdiske estis instigo por Váňa traduki ankaŭ la restantajn volumojn.

Cetere V. Váňa famiĝis jam en 1965 per sia traduko de *Romeo, Julieta kaj tenebro* de Jan Otčenášek, kiun eldonis La Laguna kun antaŭparolo de Louis Aragon (verkita ĝuste

por tiu ĉi eldono). En *Paŝoj al plena posedo* plej amuzas gaja rakonto *Kiel ni mortigadis la antaŭkristnaskan leporon*, kiu venas el la plumo de Váňa. Li estis ankaŭ eminenta filatelisto, gajninta multajn premiojn per sia Esperanta kolekto en neesperantistaj ekspozicioj.

La tradukon unue publikigis Franko Luin en sia eLibrejo kaj nun la verko finfine aperas libroforme.



Ilustrovany slovník pro děti **Mil unuaj vortoj** (vyd. Britanie) možno zakoupit za 370 Kč (+ poštovné) na adrese Ing. Josef Vojáček, Sochorova 13, 682 01 Vyškov [vojacek\\_j@jumbo.ped.muni.cz](mailto:vojacek_j@jumbo.ped.muni.cz). Slovník obsahuje 50 barevných stran s obrázky ze života dětí (ústřední obraz, kolem dokola jednotlivé předměty).



Esperantistoj el Ostrava sukcesis aperigi faldfolion de sia urbo, kiun pagis la magistrato. La tradukadon partoprenis ankoraŭ la karmemora Drahomír Kočvara, forpasinta novembre antaŭ unu jaro.

## Josef Vondroušek



Josef Vondroušek naskiĝis la 1-an de decembro 1904 en Brno, kie li ankaŭ studis liceon kaj komercan akademion kaj ekoficis kiel bankoficisto. Esperantistiĝinte en 1922, li membriĝis en Esperanto-Klubo en Brno kaj baldaŭ tie plenumis funkciojn de sekretario (1929) kaj prezidanto. De post 1931 li estis komitatano de la asocio. Li sciis krei novan publikon esperantistan kaj areton da kunlaborantoj, kiuj devenis el kursoj de li organizataj kaj persone gvidataj. J. Vondroušek komprenis la gravecon de loka agado kaj de la kunlaboro kun la centro kaj la signifon de la regulaj kunvenoj kun allogaj programoj, sciis ĝentile kaj persiste insisti pri esperantlingva konversacio kaj pri partopreno de multaj membroj en la kluba aktiveco. En 1945 fariĝis la programoj de la klub-kunvenoj en Brno afero antaŭe planata por ĉiu monatkvaro, kio estis aranĝo modela, praktikata en nemultaj kluboj aliaj sur nivelo tiom alta. Dum kvin jardekoj Josef Vondroušek preparis Bultenon de EK Brno kun la programoj kaj multaj aktualaj informoj. Li mortis la 6-an de decembro 1995 kiel 91-jara Honora Membro de UEA.

Lia plej granda merito kaj verko estas tradukado el la ĉeĥa literaturo: Karel Čapek: *Libro de apokrifoj, Rakontoj el unua poŝo kaj Rakontoj el la dua poŝo, Milito kontraŭ Salamandroj, Afero Makropulos\*, El vivo de insektoj\*, Naŭ fabeloj\*, Hor-dubal\*, Meteoro\*, Ordinara vivo\*, Italaj leteroj\*, Anglaj leteroj\*, Ekskurso en Hispanion\**. Miloslav Švandrlík: *Honestan mastrinon mi serĉas, Edzinigebla knabino\*, Zorgoj de kronitaj kapoj\*, Marlupo aŭ gaja vidvino\**. Jan Šmíd: *Puraj ĝojoj de mia vivo\*, Reveno de puraj ĝojoj\**. Zdeněk Jirotko: *Saturnin\**. Alois Jirásek: *Malnovaj ĉeĥaj mitoj\**. Eduard Valenta: *Tra la mondo nenial kaj por nenio*. Jaroslav Žák: *Pri sciado*. Viktor Dyk: *Ondro kaj drako*. Vítězslav Nezval: *El mia vivo, Kaŝludo sur la ŝtuparo*. Karolo la IV-a: *Propra biografio de Karolo la IV-a*. Václav Havel: *Aŭdienco*. Jarmila Hašková: *El la notlibro de sankta Petro\**. Božena Němcová: *Princido Bajaja\** kaj *Punita orgojlo\**. František Kožík: *Super valoj mateniĝas\**. Svatopluk Čech: *Primoloj\**. Karel Schulz: *Ŝtono kaj doloro\**.

*Propraj verkoj de J. Vondroušek: Historio kaj biografioj (1977) kaj Historie a spisovatelé (1984). Nebeletraj tradukoj: Jan Evangelista Purkyně kaj Nikolo Paganini en Vroclavo, Granda Moravio, T.G.M kaj Sociologia esploro de sintenoj al Esperanto.*

\* nepublikigitaj verkoj

## Vilibald Scheiber



Vilibald Scheiber naskiĝis la 19-an de decembro 1904 en České Budějovice en familio de muzikisto. Lia patro post transiro al Brno estis ĥorestro en kvartalo Královo Pole kaj violonisto de Nacia Teatro en Brno. Vilibald Scheiber volis fariĝi profesia muzikisto. Li studis harpoludadon, komponadon kaj muzikan direktadon. Dum certa tempo li estis ĉefo de la operejo de Silezia Nacia Teatro en Opava. Kiam li revenis al Brno kiel privata pedagogo, li instruis ankaŭ en konservatorio kaj kiel repetitoro ĉe Janáček-Akademio de Muzaj Artoj. En la jaroj 1926-1942 li estis membro de Landa Teatro en Brno. Li komponis dudekon da opusaj verkoj (kantojn, ĥorojn, pian- kaj violonkomponaĵojn, arĉkvarteton, du simfoniajn poemojn, scenejan muzikon).

Gravaj estas liaj pianverkoj por komencantoj. La 2-an de aŭgusto 1974 li mortis en Brno.

Por ni gravas lia membreco en Esperantista Klubo de Brno ekde 1945 kun la funkcio de ĉefo de artismaj muzikprogramoj. Okaze de gravaj datrevenoj de la Esperantomovado kaj aliaj li organizis publikajn artprogramojn, pli ol 60, kiuj altigis la prestiĝon de la esperantistoj ankaŭ en la ekstermovada medio. Li muzikigis poemojn de J. Kříčka, V. Fischl kaj J. Baghy kaj kunlaboris kun poeta tradukisto Jiří Kořínek - tiu esperantigis famajn ariojn de gloraj komponistoj kaj Vilibald Scheiber muzike adaptis la verkojn por modestaj kondiĉoj de kluba koncertado. En la kluba arkivo de KE Brno restis muziknotaj adaptoj skribitaj per propra mano de V. Scheiber el la famaj verkoj de Beethoven, Bendl, Bizet, Brahms, Blodek, Borodin, Balakirev, Ĉajkovskij, Dargomyžskij, Donizetti, Dvořák, Fibich, Foerster, Friml, Glinka, Godard, Gounod, Greĉaninov, Grieg, Händel, Haydn, Held, Hurník, Chopin, Chvála, Janáček, Klika, Kříčka, Lehár, Leoncavallo, Loewe, Mascagni, Mendelssohn-Bartholdy, Mozart, Musorgskij, Novák, Pícka, Ponchielli, Puccini, Raĥmaninov, Rimskij-Korsakov, Rossini, Rubiŝtejn, Saint-Saens, Schubert, Suk, Schumann, Smetana, Strauss, Thomas, Verdi, Wagner, Weber, Wolf kaj kelkaj propraj komponaĵoj de V. Scheiber.

## Omaĝo al Ora duopo el Brno

La centjaran naskiĝtagon de J. Vondroušek kaj V. Scheiber festis la esperantistoj el Brno la 4-an kaj 5-an de decembro 2004. Venis gastoj el Stuttgart, Paderborn kaj el pluraj ĉefaj lokoj, entute ĉirkaŭ tridek personoj.

Sabate la antaŭtagmeza diskutado pri interkluba kunlaboro donis kelkajn pensigajn ideojn. En la prelega posttagmezo M. Smyčka kaj H. Supová-Halířová prezentis la verkaron de V. Scheiber, poste Z. Hršel, M. Malovec, V. Barandovská kaj J. Čejková laboron de J. Vondroušek. V. Kočvara komparis konsilojn de I. Seleznjov por tradukantoj kun la nuna praktiko, estis ankaŭ tralegita parolado de la malsana J. Patera pri E-literaturo.

La vesperan koncerton konferanseis H. Supová-Halířová, kantis ŝiaj lernantoj (junaj plenkreskuloj) kaj M. Smyčka, dancis tri junulinoj de konservatorio, violonis J. Duda kaj J. Jakubec, plane akompanis J. Drápelová kaj J. Michalcová. Estis prezentitaj klasikaĵoj de la monda kaj ĉefa muziko, kantoj plejparte en Esperanto (unu el la junaj kantistoj eĉ aliĝis al la klubo). Nelonga filmo rememorigis arton de la karmemora basulo Václav Halíř.

Dimanĉe matene la partoprenantoj kunvenis en la klubejo, aŭskultis magnetofonan prelegon de J. Vondroušek pri tradukado, poste kelkaj foriris trarigardi la urbon, la ceteraj diskutis pri tradukado en Esperanton kaj kiel eduki novajn talentojn. Samtempe en alia klubejo okazis seminario pri planlingvoj.

## DIZIONARIO ESPERANTO-ITALIANO, ITALIANO-ESPERANTO

de Umberto Broccatelli estis eldonita de la grava eldonejo Zanichelli. 14,6 EUR, 520 paĝoj, formato 130 x 178 cm. Pli ol 24.000 vortoj en la sekcio Esperanta-itala, pli ol 17.000 vortoj en la sekcio itala-Esperanta, frazeologia sekcio kun pli ol 240 frazoj.

### El Esperantujo

- Universitato, situanta en la ĉina urbo Dalian, Liaoning-provinco, seninterrompe instruas Esperanton 22 jarojn. Ĉijare 109 studentoj el 14 institutoj de la universitato en la unua semestro de la studjaro 2004/2005 anoncis sin kaj serioze lernis en la Esperanto-kurso, kiun gvidis Prof. Wang Tailin.
- La 22–24-an de oktobro 2004 en la japana urbo Inuyama okazis la 91-a Japana Esperanto-Kongreso kun ĉefa temo *Ĝoju kaj kunvivu Esperante*. Ĝin partoprenis 457 aliĝintoj (el ili 123 nur morale aliĝintaj), ankaŭ gastoj el Belgio, Usono, Vjetnamio, Rusio, Pollando, Litovio.
- Kroata Ministerio pri kulturo aprobis financajn rimedojn al Kroata Esperanto-Ligo por eldoni ĉinlingvan tradukon de la kroata infanlibro WAKAJTAPU de Joza Horvat. La libron esperantigis Zlatko Tišljar kaj el Esperanto ĉinigis Hu Guozhu. Antaŭe la Ministerio aprobis rimedojn por la bengala traduko de la infanlibro MIRINDAJ AVENTUROJ DE METILERNANTO ĤLAPIĈ (esperantigis Maja Tišljar kaj enbengaligis Probal Dasgupto).



## Elŝutebla: la listo de brokantaĵoj

Ekde nun oni povas esplori ankaŭ la liston de brokantaĵoj ne nur rete, sed ankaŭ konservi ĝin en propra komputilo. La listo kun ĉ. 900 titoloj, i.a. de tre malnovaj kaj maloftaj eldonoj, estas elŝutebla de ĉi tie:

<http://katalogo.uea.org/listo/brokant.zip>

Ĝi estas pakita per Zip kaj ampleksas nur 37 Kb. La ebleco supozeble ĝojigos samideanojn kun malrapidaj konektoj.

*inf: Andrej Grigorjevskij*

## JOTI kaj Skolta Esperanto-Ligo

Tutmonda Skolta-Ĵamboreo en Interreto (JOTI) estas internacia skolta renkontiĝo en la reto, kiu okazas ĉiun jaron dum la tria semajnfino de oktobro. Ĝi estas oficiala evento de Monda Organizaĵo de la Skolta Movado. (Normale ĵamboreo estas tutmonda skolta tendaro, kiu okazadas ĉiun kvaran jaron). SEL partoprenas JOTI - ekde la jaro 1999. Dum tiu semajnfino miloj da geskoltoj el la tuta mondo renkontiĝas kaj komuniĝas surbaze de la reto, uzante lokajn teknologiajn eblojn, jen ret-navigilojn, jen ret-poŝton, jen babilejojn, jen mikrofonojn, jen bildo-bitigilojn, jen ret-kameraojn. JOTI ebligas al geskoltoj krei amikecon en aliaj landoj kaj eltrovi iom pri iliaj ordinara kaj skolta vivoj. Ofte tiuj kontaktoj daŭras jarojn, kaj estas la bazo por estontaj grupvojaĝoj kaj projektoj. La nura baro estas ling-

voj. Pro tio, ekde la jaro 2000, Skolta Esperanto-Ligo vigle partoprenas, farante diversajn novajn amikadojn, kaj diskonigante pri nia lingvo. Post plurjara instigo al la kunordiganto, ekde la pasinta jaro, okaze de la aliĝo Esperanto aperas kiel unu el la ebloj. Ĉijare ĝi estas plene akceptita kiel unu el la oficialaj lingvoj.

(<http://ttt.esperanto.org/skolta/joti>,  
<http://www.joti.org>).

## Bicikla vortaro

BEMI-ttt-ejo

(<http://bemi.free.fr/biciklo/>) ricevis 242 vizitantojn en septembro 2002, 489 en septembro 2003, kaj 830 en septembro 2004! - kaj ĉirkaŭ 90% de la vizitoj estas por la vortareto... Nun la vortareto entenas 14 lingvojn, ĉar oni aldonis 4 novajn: hispanan, portugalan, hungaran kaj ĉinan (de s-ano "Xiong Linping").

*Zav'*

## Profesia entrepreno pri internacia komerco lanĉas servojn en Esperanto

Feliso estas brazila entrepreno, kiu asistas aliajn firmaojn, precipe etajn kaj mezgrandajn, eniri en internacian komercon. Nun, danke al Esperanto, ĝi pretas proponi tiujn servojn al individuoj kaj firmaoj tra la tuta mondo. Ĝi lanĉis siajn servojn en Esperanto, kune kun propono pagi esperantistojn por kunlaboro. Pliajn informojn kaj la adreson de la retejo de Feliso eksciuj ĉe:

<http://gxangalo.com/noticoj/1697.html>

*Pablo Leon*

## **Helpu nin helpi esperantistojn. Donacu por la kampanjo "Esperanto en la bibliotekojn!"**

Lastatempe vi povis legi pri sendado de multaj libro-pakaĵoj al bibliotekoj publikaj kaj de Esperanto-grupoj tra la mondo. La librojn sendas ĉefe Aloísio Sartorato, [ludoviko44@yahoo.com.br](mailto:ludoviko44@yahoo.com.br), de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Brazilo, kaj komisiito de UEA por la kampanjo "Esperanto en la bibliotekojn!". Sed ankaŭ la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj en Japanujo regule sendas librojn al eksterlandaj bibliotekoj kaj UEA mem sendas kaj SAT-amikaro, ktp.

La sendado estas financata de esperantistoj. En UEA oni sendu sian kontribuon per la kutimaj pag-manieroj al la Fondaĵo Edukado kun la indiko "Bibliotekoj".

P.S. Se vi sendas monon al UEA por la Fondaĵo Edukado, bonvolu tion klare mencii sur la pagilo. Pagmanieroj estas troveblaj en Jarlibro de UEA p. 33.

Unu el la pagmanieroj estas: Poŝtbankkonto 37 89 64, Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam.

IBAN: NL24PSTB0000378964 (kvar nuloj, ne majuskulaj literoj O) SWIFT: PSTB NL21 Mencion de IBAN kaj SWIFT kodoj permesas senpagan transkontigadon en Eŭropo.

## **Retpaĝaro pri poŝtmarkoj**

Estis lanĉita retpaĝaro pri poŝtmarkoj. En ĝi vi trovas katalogon laŭ lando kun

bildoj kaj datenoj de la poŝtmarkoj. En la paĝaro vi povas ne nur rigardi, sed ankaŭ aĉeti kaj vendi viajn poŝtmarkojn. Ĉiuj interesigantoj vizitu:

[http://dauphin.guy.free.fr!](http://dauphin.guy.free.fr)

*laŭ Daniel Perard*

## **MusicExpress en Esperanto**

La tre populara brazila TTT-ejo, MusicExpress, ne estas TTT-ejo pri muziko en Esperanto, sed ekde nun TTT-ejo en Esperanto por muziko! En MusicExpress vi trovos informojn pri artistoj de la tuta mondo en pluraj stiloj kaj lingvoj (dekoj da Esperantaj), MP3-dosierojn, muziktekstojn kun akordonomoj, komputilajn programojn kaj ĉiusemajne aktualajn novaĵojn pri muziko, pri tio, kion faras niaj artistoj kaj pri ĝeneralaj muzikaj temoj.

<http://www.musicexpress.com.br/eo>

## **AGO-SEMAJNO: "KVAZAŬ ANTAŬKONGRESO DE LA 61-A IJK EN POLLANDO"**

Nome de klubo Varsovia Vento, PEJ kaj la LKK de la 61-a IJK en 2005 en Pollando, mi invitas vin partopreni "AGO-SEMAJNON", la gajan novjaran renkontiĝon, kies celo estas i.a. pripensi la organizadon kaj la programon de la venontjara junulara kongreso. "ASO" okazos en Zakopane, de la 27-a de dec. 2004 ĝis la 2-a de jan. 2005, en la ejo de la estonta amasloĝejo por IJK. Ĉiuj necesaj informoj troveblas en la retejo de Varsovia Vento: [www.viavento.org](http://www.viavento.org) sub la ligilo "AGO-SEMAJNO".

## Junaj esperantologoj prelegu en Vilno

Estas fakto, ke jen kaj jen aperas junaj talentaj esperantistoj kun universitata klero, eĉ kun doktoreco, kiuj verkis interesajn esperantologiajn studojn, prezentis magistrigajn aŭ doktorigajn disertaĵojn aŭ intencas tion fari, kaj tamen restas relative nekonataj. La bedaŭrinde nesufiĉa intereso en la movado por tia scienca agado ofte sekvigas certan frustron aŭ eĉ malaperon de tiuj talentuloj. Sed ni bezonas ĉiun talentulon, ne nur en la sferoj de faka apliko, beletro ktp., sed ankaŭ aparte en la sferoj de interlingvistiko kaj esperantologio. Ja restas ankoraŭ multo por esplori pri internacia lingva komunikado, pri planlingvoj kaj - aparte - pri Esperanto kun sia komunumo, por havi pli bonan science bazitan fundamenton por niaj klopodoj kaj argumentoj. Pro tio la tradicia esperantologia konferenco, okazanta kadre de la UKo 2005 en Vilno, ĉi-foje ne rilatiĝos al iu konkreta temo, sed estu loko aparte por junaj esperantologoj. Ili prezentu siajn studofinajn disertaĵojn, diskutigu siajn aperintajn aŭ aperontajn verkojn aŭ informu pri temoj, pri kiuj ili estas laborantaj aŭ pri sciencorganizaj aspektoj de ilia esperantologia agado. Krom tio la konferenco diskutu, kion ŝanĝi, por ke junaj intelektuloj, provizitaj per diversfakaj modernaj scioj, sin sentu pli forte ol ĝis nun motivitaj verki science pri Esperanto.

Estas planite eldoni la aktojn de la konferenco. La Estraro de CED, kiu aŭspicias la konferencon, inter la

altkvalitaj kontribuoj elektos la plej bonan por eventuala aperigo en la sociolingvistika revuo "Language Problems & Language Planning". En kazo de neceso oni klopodos trovi eblecon finance subvencii la partoprenon de taŭgaj kandidatoj. Interesatoj sin anoncu ĉe d-ro Detlev Blanke ([dblanke.gil@snafu.de](mailto:dblanke.gil@snafu.de)).

## Vinilkosmo-novaĵoj 2004

VKKD 73 „**Mi Estas**“ de ĴAK LE PUIL. Protestkanzonoj, amkanzonoj, ŝercanzonoj... Vi trovos en ĝi kvar originalajn titolojn komponitajn de Ĵak laŭ tekstoj de Eŭgeno Miĥalski, Claus J. Günkel, Tomáš Pumpr kaj Stefan Maul; poemon de Radoj Ralin laŭ traduko de Marin Bacev, *La prezidenta ĉaso* tradukitan de Jopetro Danvy, la *Kongresurboj* eltiritan el la kasedalbumo *Revenas mi*, kaj pluraj aliaj.

VKKD 74 „**Plaĉas al mi**“ KAJ TIEL PLU. Katalunaj sonoj de flutoj, mandolinoj, diversaj perkutiloj, kaj voĉoj disvolvigitaj...

VKKD 75 „**Nokto iĝas Tag'**“ de RALPH GLOMP. Lia stranga voĉo, liaj vortoj direktitaj al la tuta planedo, sed ankoraŭ nur komprenataj de kelkuloj, la elektronikaj sonoj uzataj nature, sed ne sen majstreco, kreas tiom da elementoj kiuj ekscitas la scivolemon kaj ŝajnas aŭguri mondon, kiu nur aspiras je ekzisto....



## Vysočina pri Esperanto

La ĵurnalo Vysočina dediĉis la 6-an de septembro 2004 unu paĝon al Esperanto dank' al geedzoj Viktor kaj Libuše Dvořák el Moravské Budějovice. La paĝo prezentis tri artikolojn: *Jak mohu cestovat s esperantem?* (Kiel mi povas vojaĝi kun Esperanto?), *Jsou i takoví fandové, kteří nejprve dítě učí esperanto* (Ekzistas eĉ tiaj hobiuloj, kiuj al sia infano instruas unue Esperanton) kaj *Theodor Kilian se esperantu učil jako zajatec* (Theodor Kilian lernis Esperanton kiel militkaptito). La lastan artikolon verkis Pavel Sittauer.

## Kultura Centro Esperantista

(KCE) organizas la duan sesion de la Esperantologia Fakultato, en La Chaux-de-Fonds (Ĉaudefono) inter 2-a–6-a kaj 9-a–13-a de aŭgusto en 2005. Eblas partopreni nur en unu el la du semajnoj, kvankam la programo ne ripetiĝas. Eblas sekvi ankaŭ nur parton de la lekcionoj. La Fakultato proponas kvar periodojn (po 1,5 horoj) ĉiutage, kun tri diversaj profesoroj: - Duncan Charters (Usono), pri metodiko de la lingvoinstruado, kun specifa rilato al Esperanto; - Giorgio Silber (Eŭropo), pri elementoj de historio de la Esperanta parolkomunumo kaj ĝia kulturo; - USUI Hiroyuki (Japanio), pri interkulturaj problemoj en Esperantio. La Esperantologia Fakultato 2005 estos aparte interesa por ĉiu, kiu deziras instrui Esperanton. KCE proponas ne nur la kursejon, sed ankaŭ la loĝigan servon, je moderaj prezoj.

## Libera Eŭropia

### Universitato Kelemantia

de AIS (LEUKAIS) en Komárno (Slovakio, strato Župná 1) estis inaŭgurita en semajno inter la 29-an de aŭgusto kaj 5-a de septembro 2004. Ĝi havas kvar fakultatojn: **Sanmarinecaj Universitataj Sesioj (SUS), Eŭropiko, Interkultura dialogo, Medicina fakultato**. La dek salonoj estis nomitaj laŭ esperantistaj eminentuloj (Zamenhof ricevis la trian salonon por interkultura dialogo). La ĉefa motoro de LEUKAIS estas prof. Helmar Frank. Ni jam informis pri la universitato en Starto 2/2004 (211).

RET-INFO

## Vortaro Nederlands- Esperanto-Nederlands

de Petro De Smedt. Ĝi estas vortaro nederlanda-Esperanta kaj Esperanta-nederlanda kun pli ol 44000 vortoj, 12000 parolturnoj, 900 proverboj en la parto nederlanda-Esperanta kaj 17 000 vortoj, 2500 parolturnoj kaj 450 proverboj en la parto Esperanta-nederlanda.

La verko enhavas 576 paĝojn kaj sekve estas multe pli ampleksa ol la vortaro de Middelkoop, kiu dum jaroj estis la ĉefa vortaro en Flandrujo kaj Nederlando. La prezo de la verko estas 18 eŭroj + afranko. Ĉiu vortaro krome enhavas valorkuponon, per kiu eblas ricevi la kodroman version de la vortaro, kiu aperos en marto 2005 kaj kiu estas rezervita por la aĉetintoj de la papera versio.

RET-INFO

## XV-a Esperanto-tago



*en Rybitví apud Pardubice 28.8.2004. Saluto de la vicurbestro, kaj la familio Rýznar (Jarmila, filinoj Mirka kaj Lenka, nepo Petr) preparita por 45-minuta deklama ĉeno pri la vivo kaj verkaro de d-ro Schulhof (vidu la lastan paĝon en Starto 3/2004).*

## Skokovy

Novembra lingva seminario en Ĉeĥa paradizo en Skokovy finiĝis. Partoprenis 33 geesperantistoj kaj ĝuis hejmeccan etoson kaj eĉ lastan tagmezan sunon. Oni solenis jubileon de nia kara doktoro Hradil kaj ĝojigis lin kaj ĉiujn per freŝaj voĉoj de junaj anoj de la klubo. La programo estis vere ekzotika per tritaga daŭrigo de rakontado kaj bildoj pri Ĉinio kaj per prelegoj pri magiaj desegnaĵoj en Anglujo sur grenkampoj, kiujn proprakule vidis Margit, kaj raporto pri brazilano, kiu venis por konatiĝi kun personeco de Jan Hus kaj kiu renkontis kaj travivis en Ĉeĥio helpe de vico da esperantistoj kaj neesperantistoj densajn dek tri tagojn. Ĉar ni havis por lernado kvar grupojn, ĉiuj havis spacon por realigi sin mem. La venonta semajna

lingva seminario en Skokovy okazos de 11-a de aprilo ĝis 17-a 2005. Aliĝu kiel kutime por la dudeka seminario al Jindřiška Drahotová, Sadová 745, 293 01 Mladá Boleslav, telefone + 420/326 731 845, ret-poŝte

[drahotovaesperanto@seznam.cz](mailto:drahotovaesperanto@seznam.cz),

vi estos bonvena.

## Pastorelo

estas kristnaska kontempla programo de Věra Ludíková okazinta la 14-an de decembro 2004 en *Galerio Vojo al la Lumo* en Prago. Enkonduka vorto de Zdeněk Hajný estis prezentita ankaŭ Esperante lege de Josef Vích. Pastorelon *Aminda alaŭdo* kantis Renata Jandová, violonis Alexej Štěřba kaj pianludis Jiří Frank.

## Eli Urbanová en televido

La 29-an de oktobro 2004 je 12,30 h la *Ĉeĥa Televido 1* elsendis duonhoran programon por senioroj *Barvy života* (Koloroj de la vivo), je kies fino la plej longa kontribuo estis dediĉita al nia poetino Eli Urbanová. La programero estis filmita en ŝia loĝejo proksimume unu monaton pli frue. Ŝi montris siajn esperantlingvajn librojn, legis kelkajn poemojn Esperante kaj ĉeĥe (en traduko de Josef Rumler), rakontis pri sia esperantista vivo pasinta kaj nuntempa en senjora aĝo. Ŝia pura ĉeĥa prononco kaj ĝusta gramatiko kontrastis kun la antaŭaj parolantoj, tial ŝi verŝajne parolis la lasta kaj plej longe.



## Esperanto en Svitavy



Kiel ĉiujare ankaŭ ĉiaŭtune la Klubo de Esperanto-amikoj en Svitavy aranĝis la 9-an de oktobro 2004 Esperanto-renkonton. Kunveturis 30 partoprenantoj el 12 urboj de la respubliko. La esperantistoj vizitis la Urban Muzeon, trarigardis ekspoziciojn de lavmaŝinoj, gladiloj kaj pri la agado de Savstacio „Zelené Vendolí“ kompletigitajn per ekspozicioj de bildoj, skulptaĵoj kaj fotoj pri naturo. La ekspozicioj entuziasmigis ĉefe instruistojn, kiuj planas viziton kun infanoj. La posttagmeza programo prezentis raportojn de E-rondetoj, interŝanĝon de spertoj kaj planojn de novaj renkontiĝoj kaj de ekskurso al UK en Litovio. Nia rondeto povis fieri per siaj junaj esperantistoj el la V-a elementa lernejo. Poste sekvis video-prezentado kaj scenoriĉa rakontado de Kvido Janík, esperantisto el Šumperk, pri lia vizito de 7 usonaj ŝtatoj, precipe de usonaj naciaj parkoj.

*Libuše Dvořáková*

## KAEST 2004



*Dobřichovice 2004-11-12/14*

Vendrede je la 16-a horo estis inaŭgurita la konferenco por proksimume 40 partoprenantoj. Detlev Blanke (Germanio) en sia prelego **Kio estas faklingvo?** klarigis, ke terminologio estas nur parto de faklingvo, al kiu apartenas ankaŭ fakaj tekstoj kaj faka komunikado. Kiel sublingvo ĝi konsistas el lingvaĵoj de sciencoj, teknikoj, ekonomio, produktado kaj konsumado, kiuj trovas sian formon en monografioj, eseoj, leksikonoj, recenzoj, resumoj, biografioj, lernolibroj, produkt-akompanaj tekstoj ktp.



Heinz Hoffmann en **Problemo de „nespecifa“ speco** atentigis, ke estas pli facile trovi terminon por specifa objekto (motorvagono, stirvagono, senmotora stirvagono) ol unusence terminologie esprimi la originan nespecifan objekton (vagono - kiel montri, ke oni parolas pri originala simpla vagono sen postaj pliperfektiĝoj?). La vendredan programon fermis Wera Blanke **Pri terminoj el Vikipedio - ekzemploj el la teatra fako**. Vikipedio estas interreta enciklopedio, kiu havas jam version en 80 lingvoj (ankaŭ en la ĉeĥa, Volapuko, Esperanto, Ido, Interlingue kaj Interlingua). W. Blanke observis la terminojn *teatro*, *aktoro* kaj *rotacia scenejo* kaj iliajn klarigojn en la lingvoj germana, angla kaj Esperanto kaj trovis ilin nesufiĉe eksplikitaj.


Sabatan programon startigis Martin Minich (Slovakio) per prelego **Esperanto@interreto**, en kiu li prezentis junularajn retajn projektojn *lernu!*, *Lingva Prismo*, *Interkulturo* k.s. Marc Bavant (Francio) priskribis **Aplikon de XML al fakaj laboroj pri Esperanto** (XML estas komputila lingvo). **La lingvaj kostoj en la Eŭropa Unio** estis temo de Otto Haszpra (Hungario). Miroslav Malovec informis pri enkomputiligo de **La Enciklopedio de Esperanto** kaj pri ebloj de ĝia aktualigo. Jan Werner parolis pri **Planlingvo**, kiel ni ofte nomas Esperanton, ne konsciante tute precize, kion tiu termino fakte signifas. Amuzan kaj spritan

ekskurson en la mondon de parazitoj prezentis Rüdiger Sachs (Germanio) en sia **Parazitismo kaj parazitologio**. En la homan turismikon enkondukis la aŭskultantojn Boĵidar Leonov (Bulgario) en **Evoluo de la internacia kaj ekologia turismo en Eŭropo**.

Dimanĉe Josef Hron skizis **Eblojn por la elektronika prilaborado de la grandaj tradukaj vortaroj de Esperanto** per ekzemplo de sia propra elektronika vortaro. Sekvis ĝenerala diskuto. Ĉeestis 40 partoprenantoj el 12 landoj (BG, CZ, DE, DK, FR, HU, JP, LT, PL, RO, SI, SK). Dum vigla diskuto ne nur pri la temoj, sed ankaŭ pri la nova PIV, la stato de TEC, terminologiaj principoj, AdE (ĉeestis nur du akademianoj, Marc Bavant kaj Otto Haszpra) ktp. estis ankaŭ elektita la ĉeftemo de la venonta KAEST okazonta en tradicia tempo - novembro de sekva paraĵaro, do nun 2006. La ĉeftemo estos "Interreto kaj lingvoj".

Oni akceptis la proponon de Petro Balasz (SK) esplori la eblon organizi samsemajne kaj samloke la seminarion de [esperanto@interreto](mailto:esperanto@interreto), fine de kiu okazus KAEST, kondiĉe ke la organizantoj akceptos la proponon.

*mm+pch*



## Lingvaj ludoj kaj enigmoj (19)

Solvo de la palisaroj el la antaŭa numero:

37. *Kiu amas liton, ne akiros profiton*


38. *Agordu la brustojn, ho, nia fratar' por nova pli vigla jam kanto*

Al iom malpli simplaj kombinaĵaj enigmoj apartenas

### REGPROMENO


Ĝiaj nomo kaj kombina sistemo estas prunteprenitaj el la ŝakludo. La figuro de la reĝo en tiu ĉi ludo povas „paŝi“ sur la ŝaktabulo al kiu ajn najbara kampeto. La saman eblon havas divenanto por kunligi per la linioj la literojn en la reto de la kampetoj por kompletigi la kaŝitan tekston per tiuj ĉi literoj. La teksto estas proverbo, sentenco, versaĵo k.s.

Jen eblaj paŝaj lini-tiroj:



La linioj, per kiuj estas kunligataj la literoj, devas esti simetriaĵoj laŭ la akso aŭ la centro. Tiu ĉi simetrio helpas ĉe divenado. Oni provas kombini literojn en vortojn kunligante ilin laŭ „paŝoj“ de la reĝo“ poparte sur diversaj lokoj de la reto. Tuj oni povas kontroli la taŭgecon de la tir-linioj provante la samajn tirojn simetrie, ĉu ili donas senceblajn vortojn aŭ vortpartojn. Unue do oni devas elprovi, laŭ kiu simetrio la reto estas formita.

Ekzemploj de kelkaj lini-tiroj laŭ la simetrio:




Kunligante la partajn tirojn en la kontinuan linion, oni trovas la kompletan tekston. Samtempe videbliĝos ĝia komenco kaj fino (ili troviĝas najbare kunligeblaj per unu lini-tiro).

En la jena montraĵo de la reĝpromeno estas kaŝitaj du famaj versoj el la poemo de Zamenhof:

Solvo:

M	O	T	T	A	N	O	T
A	G	U	N	I	G	R	N
L	Ĉ	E	A	L	N	A	O
O	G	R	S	N	A	M	K
B	R	A	A	R	D	A	O
T	A	A	P	F	F	E	N
R	E	T	N	T	N	A	S



La kaŝita teksto:

*Eĉ guto malgranda konstante frapante  
traboras la monton granitan*

Kaj nun provu malkaŝi la tekston en la taska reĝpromeno:

39. (La libere citita sentenco el la Biblio)

A	T	O	N	I	E
R	B	I	D	N	V
E	S	A	N	A	I
F	N	E	N	N	N
N	R	O	M	E	O
G	E	R	D	A	K
L	I	D	I	U	L
S	A	V	I	N	O

Josef Cink

## Rudolfs Libeks, la unua esperantisto loĝinta en Brazilo

La unua esperantisto, kiu loĝis en Brazilo, estis s-ro Rudolfs Libeks, latvo, kiu enmigris Brazilon en la jaro 1890, kaj loĝis en urboj, vilaĝoj kaj kolonioj de ŝtatoj Minasĝerajso kaj San-Paŭlo. Pro lia ofico rilate la latvajn enmigrintojn, li ofte vojaĝis Rio-de-Ĵanejron, kie li subite mortis la 14-an de nov. 1908.

Li estas la pioniro de E-o en Latvio: li skribis artikolojn, gvidis kursojn kaj, en ĉefurbo Riga, en 1889 lanĉis la unuan lernolibron de la Internacia Lingvo por siaj samlandanoj. Ĉar Zamenhof eldonis la unuan E-lernilon en 1887, do, tio montras, kiom frue Libeks sin dediĉis al nia grandvalora afero.

F. V. Lorenz estis la pioniro de E-o en Ĉeĥio: en la jaro 1890 li eldonis en urbo Pardubice la unuan E-lernolibron por ĉeĥoj, kaj fine de 1893 li alvenis Brazilon, do tri jarojn post Libeks.

Pro historiaj kialoj kaj pro respekto al niaj admirindaj antaŭuloj, ni juĝas farinda laboro detalan serĉadon por malkovri, ĉu Libeks aliĝis al iu brazila E-grupo? Ĉu li gvidis E-kurson en iu brazila urbo? Ĉu li publikigis artikolon portugallingvan pri E-o aŭ Esperantan pri iu ajn temo en brazila ĵurnalo, gazeto aŭ libro? Respondon atendas [pekimtv@yahoo.com](mailto:pekimtv@yahoo.com).

## Honorigo de esperantisto

Gazeto *Přerovské listy* (Ĵurnalo de Přerov) alportis informon, ke inter eminentuloj de la urbo Přerov, honoritaj per **Medalo J. A. Komenio**, estas ankaŭ **Ludvík Chytil** „pro propagando de la urbo Přerov en la sfero de la Esperanta lingvo“ (*za propagaci města Přerova v oblasti esperantského jazyka*). Gratulon!

## Ĉeĥiaj-nederlandaj ĝemelurboj

V zárí 2004 se v Praze konala konference zástupců českých a nizozemských partnerských měst. V souladu s výzvou UEA, aby se partnerské spolupráce účastnili také esperantisté, přijel na pražskou konferenci Pieter Engwirda. Příjezd sice avizoval, nikdo z nás se však konference nezúčastnil, proto prosí o dodatečnou informaci o česko-nizozemském partnerství měst, v nichž žijí čeští esperantisté, případně je činný jejich klub či kroužek. Důležitý údaj je název nizozemského města, s nímž je oficiální partnerství navázáno.

Informaci pošlete co nejdříve redakci Starta.

*M. Malovec*

## Nova UEA-volontulo

Decembre 2004 eklaboros ĉe UEA kiel volontulo juna slovako Martin Minich.

## Saleziana magazino

(ĉeĥlingva) publikigis leteron de s-anino Slávka Hamajdová pri pureco de litovaj urboj dum la Katolika Esperanto-Kongreso sub titolo „Ĉeĥoj povus preni ekzemplon de la litovoj“. Mencio pri Esperanto en alitema artikolo ofte pli efikas.

## Ze soupeřů mohou být spojenci k prosazení esperanta (2)

Dnes začnu nejprve tím, že ukážu, co je beznadějně. Totiž, stoupenci esperanta a také jazyků interlingua a interlingue jsou stále přesvědčeni, že svými informačními materiály “snad jednou konečně” dokáží přesvědčit takové vlivné lidi, kteří jsou ze svého postavení schopni plánovým jazykům nějak pomoci. Proč se to ale pořád nedaří?

Podívejme se na takoveto vlivné lidi blíže. Mohou to být buď političtí činitelé, či lidé s určitou pravomocí ve sdělovacích prostředcích, anebo renomovaní jazykovědci. Tady si však uvědomme, že všichni tito lidé nezískali své vlivné postavení jen tak, nýbrž že se do něho museli nějak propracovat!!! Museli tudíž udělat úspěšnou kariéru (je lhostejno, zda s úmysly poctivými či prospěchářskými). A jakýkoliv kariérista si chce všimnout jen toho, co je pro jeho kariéru přínosné, a nechce se zdržovat ničím “zbytečným”.

A mezi ty věci, jimiž by se kariérista nechtěl při svém růstu zdržovat, zcela jistě patří i plánové jazyky. Ty kariérista nepotřeboval nejen ve své dosavadní úspěšné dráze, ale pro samou zaslepenost svou kariérou není schopen vidět jejich význam ani ve svém dalším kariérním růstu. Vyvodme z toho tedy pro nás poučení, že vlivní lidé (= papaláši) jsou vůči informacím o plánových jazycích těmi nejhluššími lidmi vůbec.

Proto jsem došel k tomu, že úsilí je

třeba napřít jinam. Vycházím z toho, že ani v dnešní době nikdo nemůže zpochybňovat serióznost výuky latiny. Latina se nikdy na gymnáziích neučila jako dorozumivací jazyk, nýbrž jako prostředek k zvýšení všeobecného jazykového rozhledu (k tomu ještě přistupuje speciální využití latiny zejména u lékařů, biologů aj.). To, že latina pro vyjadřování o moderních záležitostech je šířena časopisem “VOX LATINA” (jak jsem o tom řekl minule), není některým latiníkům ani známo.

Již minule jsem označil hlavní plánové jazyky jako “zrationalizované varianty latiny”. A tvrdím, že – podobně jako latina – i tyto “zrationalizované latiny” by mohly být pojímány jako prostředky ke zvýšení všeobecného jazykového rozhledu. Jistě vám neříkám nic nového, neboť i při propagování esperanta hovoříte o jeho propedeutických hodnotách. Já to říkám takto: pokud jsme přemýšliví, tak naučením esperanta se z nás stane “rychlý” strukturální lingvista; a naučením jazyků interlingua a interlingue se z nás zase stane “rychlý” etymolog. Ještě je však třeba dodat, že tyto “zrationalizované latiny” jsou osvojitelné mnohem snadněji než latina sama.

(A každý, kdo se z těchto propedeutických důvodů naučí zmíněným plánovým jazykům, stane se pak pravděpodobně i příznivcem jejich využití v mezinárodním dorozumívání.)

Mezi všemi zmiňovanými jazyky jsou vztahy mnohem bližší, než by se zdálo. Totiž, na latinu a čtyři hlavní plánové jazyky se můžeme dívat jako na ruské matřjošky – latina je ta největší matřjoš-



ka a esperanto pak ta nejmenší. Větší matrjoška než esperanto je ido, ještě větší je interlingue, pak následuje interlingua a nakonec latina to všechno překrývá.

Proč je esperanto nejmenší matrjoškou?  
– Proto, že esperanto využije nejméně slov latinského původu. To se projevuje tím, že esperanto si mnoho slov dokáže samo odvodit (např.: “patro → patrino”). A projevuje se to i tím, že esperanto – aby bylo vždy jednoznačné – nepřijme ta slova latinského původu, která by se dala špatně odlišit od jiných, přičemž místo takovýchto špatně odlišitelných slov latinského původu pak esperanto přijme germánská slova z angličtiny nebo němčiny.

A právě na příkladu těchto špatně odlišitelných slov latinského původu jasně vyplyne rozdíl mezi esperantem, jazykem interlingue a jazykem interlingua:

– Latina (jakožto největší matrjoška) má např. slovo “tempus = čas”, 2. pád “temporis”. Toto slovo ale neznamena jen “čas”, nýbrž i “počasí”. Takto to přešlo i do románských jazyků, např. francouzština má “temps – čas, počasí”.

– Interlingua jakožto druhá největší matrjoška přejímá slova latinského původu tak, že si nic nepřizpůsobuje, chce být “pouhým sběratelem”; tedy slovo “tempore” v jazyce interlingua znamená “čas” i “počasí”, přičemž správný význam musíme poznat z kontextu.

– Interlingue je matrjoška o stupeň menší, což spočívá v tom, že tento jazyk si už slova latinského původu nepatrně přizpůsobí tak, aby se od sebe odlišovala. Interlingue tedy chce být

“citlivým přizpůsobitelem”. A proto se v interlingue rozliší: “tempore = čas” a “tempe = počasí”.

– (Jazyk ido vynechávám, uvádím ho spíše pro úplnost jako přechod mezi a esperantem a jazykem interlingue.)

– Esperanto je nejmenší matrjoška, což spočívá v tom, že latinské východisko tu bylo podrobena radikálním zásahům. Jak jsem již řekl výše, místo špatně odlišitelných slov latinského původu přijalo esperanto germánská slova z angličtiny nebo němčiny. Esperanto chce být tedy “radikálním rekonstruktorem” (“radikálním rekonstruktorem” je esperanto i v tom, že tvoří takové odvozeniny jako výše uvedené “patro → patrino”). Tudíž esperanto rozliší: “tempo = čas” (podle latiny) a “vetero = počasí” (podle německého “Wetter”).

Příště bych vám rád řekl o dalších pozoruhodných vztazích hlavních plánových jazyků vůči latině (předesílám, že jsem došel k tomu, že vůbec není náhoda, že esperanto je takové, jaké je; z toho vyplývá i genialita L. L. Zamenhova, který tudíž esperanto nikoliv vynalezl, nýbrž intuitivně objevil). Toho všeho bude dobré využít při propagaci. Opět se tedy těším na vás příště.

*PhDr. Ing. Karel Podrazil*

*Liberec*

## **Bildkarto kaj kalendareto**

EK Plzeň eldonis novan bildkarton kaj kalendareton 2005 (5+2 Kč) kun Esperanta teksto. Mendu ĉe Václav Kaprál, 331 51 Kaznějov 252 (sendu poŝtmarkon 6,50 Kč) aŭ rete [esperantoplzen@centrum.cz](mailto:esperantoplzen@centrum.cz). Pagi eblas ankaŭ per validaj ĉeĥaj poŝtmarkoj.

## Ni kondolencas

Ĉijare forpasis niaj samideanoj: **PhDr. Lubomír Jakl**, Praha 4 (71-jara), **Hana Drápalová**, Brno (83-jara), **Jaroslav Hradecký**, Jablonec nad Nisou (81-jara, mortis 19. 4. 2004), **Vojtěch Trojan**, Žacléř (28. 11. 2004).

## Korespondi deziras

Mia nomo estas Kevin Robb, mi loĝas en Aŭstralio, sur la Oro-Marbordo, kiu estas 100 kilometrojn sude de Brisbano, la ĉefurbo de Kvinslando. La Oro-Marbordo estas la ĉefa turisma regiono de Kvinslando, kie oni trovas golfludejojn, amuzparkojn, belegajn plaĝojn, subtropikajn arbarojn kaj sukerofarmojn. Mi havas 34 jarojn, mia fianĉino nomiĝas Andrea, kaj ties 7-jara filino Danielle. Ili estas de Nov-Zelando. Mi laboras por telefona firmao. Mi ŝatas naĝi, legi, vidi kinofilmojn, kaj vojaĝi. Mi lernis Esperanton antaŭ 8 jaroj. Mi deziras korespondi Esperante kun samideanoj de Ĉeĥio. Mi preferas korespondi per e-poŝto. Bonvolu doni mian e-poŝtan adreson al viaj membroj

[kevrobb@bigpond.com](mailto:kevrobb@bigpond.com)




## Kiu lernigos al mi la ĉeĥan?

Venontjare mi intencas viziti la Ĉeĥan Respublikon kaj tial mi serĉas kontaktojn en via lando. Interesas min la ĉeĥa lingvo kaj mi bezonus iun, kiu helpus min en la lernado. Mi volonte korespondus kun ĉeĥoj en Esperanto aŭ eventuale en via gepatra lingvo.

[m.bamberski@interia.pl](mailto:m.bamberski@interia.pl)

Marek Bamberski, ul. Zrodlna 6, Huta Stara, 42-350 Kozięglowy, Polsko.



## Josef HRADIL - 80

La 22-an de novembro 2004 atingis sian 80-jariĝon d-ro Josef Hradil, kuracisto, honora membro de ĈEA. Li estas motoro de la movado en Mnichovo Hradiště (bulteno Verda Familio), kaj de iama medicinista sekcio de ĈEA (*Medicinstaj Informoj, Sano*), grava membro de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), por kiu li prilaboris *Medicinstan terminaron* (1979); en sia pensio Esperanto en Skokovy li helpas al Asocio de Esperantistaj Handikapitoj (AEH) aranĝi kursojn.

# KALENDARO

29. 12. 2004 Silvestro en Česká Třebová

11.-17.4. 2005 Skokovy

## Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Komerční banky vyplníte pokladní složenku pečlivě ve všech kolonkách, tedy: *měna účtu*: Kč, č. *účtu*: 3330 021/0100, *měna hotovosti*: Kč, *částka*: kolik platíte, *jméno a příjmení*, adresa, RČ (nemusí být). Důležitá je kolonka **Vklad jménem** kde uveďte znovu své jméno a pokud platíte za klub (EK, sekci) uveďte stručně (EK Velim) a pošlete tajemníkovi jmenný seznam. Nezbytně nutný je variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stálé (viz seznam) nebo bude vždy uvedeno pro jednotlivou akci. Konstantní symbol je 0379 při platbě v hotovosti. Při bezhotovostní platbě z účtu je KS 0308. Pokud platíte více položek, sečtete je a poukažete celkovou částku (ušetříte svazu bank. poplatky). Rozpis položek pošlete tajemníkovi. Seznam čísel:

**06940** členství ČES

**06941** členství UEA

**06942** předplatné Starta bez členství

**06943** dary ČES

**06944** zápisné do Odborné knihovny ČES

**07001** předpl. Monats (650,-Kč)

**07002** předpl. La Gazeto (650,- Kč)

**07003** předpl. La Ondo de Esp-o (500,- Kč)

**07004** předpl. Juna Amiko (300,- Kč)

**07005** předpl. Literatura Foiro (970,- Kč)

**07006** předpl. Heroldo de Esp-o (1030,- Kč)

**07007** předpl. Femina (650,- Kč)

**50200** sekce železničářů

**50400** komise pedagogická

**50401** písemný kurs začátečníci

**50402** písemný kurs pokročilí

**50403** členství ILEI

**50404** Paroliga kurso

**50405** svazové zkoušky

**50800** sekce nevidomých LIBE

**50900** sekce zdravotníků UMEA

**51000** sekce křesť. esp. KELI

**51100** sekce katol. esp. IKUE

**51200** sekce informatiky

**70100** komise pro tisk a inf.

**80200** ediční fond

**80300** propagace v tisku

**80400** fond Tilio

## Zájemci o časopisy,

pište na adresu nového peranta: Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz Variabilní symboly (v.s.) a částky najdete také v levém sloupci této strany

**Monato**: 650,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4

**La Gazeto**: 650,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

**La Ondo de Esperanto**: 500,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4

**Juna Amiko**: 300,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formát A5

**\*Literatura Foiro**: 970,- Kč, v.s. 07005, 6 čísel, 56 stran formátu A 5

**\*Heroldo de Esperanto**: 1030,- Kč, v.s. 07006, 17 čísel, 4 strany formátu A 3

**\*Femina**: 650,- Kč, v.s. 07007, 4 čísla, 28 stran formát A 4

\*Ke třem posledně jmenovaným časopisům vydavatel vzkazuje, že předplatitelům z bývalých socialistických zemí prodlouží předplatné na rok 2005 automaticky o další rok (do prosince 2006), pokud současně zažádají o Esperantské občanství (v tzv. Esperanta Civito).

Všechny platby možno platit na účet svazu 3330 021/0100, Komerční banka Poděbrady podle pokynů **Jak platit svazu** (viz vlevo).

Periodikum Českého esperantského  
svazu (35. ročník)

Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

malovec.starto@clavis.cz;  
www.clavis.cz/starto

Členská evidence a změny adres:  
Pavel Polnický, ČES

---

Uzávěrka dalšího čísla: 1.2.2005

---

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-  
Asocio (35-a jarkolekto)

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj  
aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 10 eŭroj  
(se aerpoŝte: + 2 eŭroj)

Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, e-mail:  
malovec.starto@clavis.cz;

www.clavis.cz/starto

Presis: HRG Litomyšl

---

Redaktadfermo de la sekva numero  
: 1.2.2005

---

ISSN 1212-009X

**Esperanto-klubo Prostějov** oznamuje,  
že od 1. ledna 2005 se budou pravidelné  
čtvrteční schůzky konat od 17.00 hod.  
již v nové klubovně na Křížkovského ul.  
č. 12 v Prostějově. Klubovna se nachází  
v centru města.

## OSIEK-PREMIO 2004

En 2003 la Osiek-anoj proponis 27 verkojn  
premiindajn: ĉiuj estis prezentitaj en la julia  
numero de *La Gazeto*. La 23an de julio,  
dum la IEK en Pécs, Hungario, sekreta  
voĉdonado atribuis la premion al

**Ed BORSBOOM**



pro

**“Vivo de Andreo Cseh”**

Gratulon!

La premio, 500 €, rekompencas vivantan  
aŭtoron pro publikigita verko ne fikcia aŭ  
pro grava traduklaboro

informoj: *La Gazeto*, 55210 Creuŝ, Francio <http://osiek.org>

**Nezapomeňte uhradit** svůj  
členský příspěvek do konce roku 2004!  
Těm klubům a kroužkům, které zaplatí  
do 31.12.2004, převedeme 10% na jejich  
subkonto u svazu.